# LIGILO

n-ro 4 - Oktobro 1987

eldonkvanto: 7.000 ekzempleroj

redaktis : BEL-estraro

---

## ADRESARO DE B.E.L. - AFERO TRE GRAVA

Ĉiuj lernantoj, eks-lernantoj kaj inform-petintoj de esperanto estas potenciale esperantistoj. Eble ili aĉetos esperantajn librojn kaj daŭrigos aŭ komencos siajn lernadojn. Transdoni al B.E.L. ties adresojn povos: enkonduki ilin en la esperantan movadon; reentuziasmigi ilin al la lernado; kutimigi ilin al la literatur- kaj revu-legado; helpi la eldonistojn kaj la librovendistojn per pli-altiga disvendado de libroj kaj revuoj; helpi la financ-rimedojn de la esperantaj organizoj; k.t.p. Do, sendu al B.E.L. adresaron de viaj gelernantoj kaj de ĉiuj aliaj esperantistoj de vi konataj, kaj lasu la ceteron kun B.E.L.

## POLITIKA PARTIO ANONIME UZAS NOMON DE NIA LIGO

Jam de kelkaj monatoj malagrable B.E.L. ricevadis cirkuleron de memnomata "Partido do Bem Comum", afrankita en Belorizonto, kaj dissendita, laŭ la cirkuleroj, al pluraj aŭtoritatuloj kaj organizoj. Adreso(j) kaj nomo(j) de la respondeculo(j) kaj de la sendinto(j) ne estas en la cirkulero. B.E.L. forpuŝas tian konduton, kaj postulas de iliaj respondeculoj, forigi nomon de B.E.L. de tiu politika movado, ĉar B.E.L. ne sin miksas en aliajn aferojn krom ESPERANTO.

---

KIE OKAZOS LA 24-A KAJ 25-A BRAZILAJ KONGRESOJ DE ESPERANTO?

Decidite, estos la belega urbo Maceió kiu ŝirmos la brazilan esperantistaron okaze de la 24-a B.K.E. Motivo de multobla kontentigo: krom la fest-etoso de niaj kongresoj, la plezuro por ĝui, en la alagoana ĉefurbo, agrablan veteron, popolan gastemecon kaj belegajn pejzaĝojn.

Kaj la 25-a Kongreso? Estos en Campo Grande/MS ! Bonege, ĉu?

---

ATENTON ! — ATENÇÃO

---

RIMARKOJ AL LA MALFRUANTOJ

Ĉi tiu estas la lasta LIGILO disdonita al tiuj, kiuj ne pagis la kotizon rilatan al la jaro 1987.

Ekde la venonta numero nur la asocianoj ricevos ĉi tiun publikaĵon.

La kialo estas el financa ordo. Ligo ne povas daŭri subteni la elspezojn kaŭzitajn de la aktualaj preskvantoj de ĉi tiu informilo kaj eĉ kun la poŝtaj elspezoj devenaj de sia disdonado.

Tamen, nia deziro estas ke ĉiuj daŭre ricevu LIGILON.

Do, sendu al ni la koncernajn Cz$ 300,00 kaj garantiu vian ekzempleron.

NOTA AOS RETARDATÁRIOS

Este é o último LIGILO distribuído àqueles que não pagaram a cota relativa ao ano de 1987.

A partir do próximo número somente os sócios receberão esta publicação.

A causa é de ordem financeira. A Liga não está podendo continuar arcando com os gastos ocasionados com as atuais tiragens deste informativo e nem com as despesas postais decorrentes da sua distribuição.

Todavia o nosso desejo é que todos continuem recebendo o LIGILO.

Portanto, envie-nos os respectivos Cz$ 300,00 e garanta o seu exemplar.

---

STAMPILO PRI LA CENTJARIĜO

Kadre de 23-a BKE, ECT (Empresa de Correios e Telégrafos) solene lanĉis stampilon omaĝe al la 100 jaroj de Esperanto.

Bildkartoj de Rio de Janeiro kun 1 aŭ 4 poŝtmarkoj de 66-a UK kaj stampita el la menciita stampilo haveblas ĉe BEL-Libroservo.

## STATISTIKO

De la 1-a de Januaro 1986 ĝis nun B.E.L. havis 844 anojn, tiel distribuitaj tra Brazilo:

| | | | |
|---|---|---|---|
| ACRE.................... | 2 | PARAÍBA............... | 8 |
| ALAGOAS................. | 8 | PARANÁ................ | 9 |
| AMAZONAS................ | 3 | PERNAMBUCO............ | 14 |
| BAHIA................... | 39 | PIAUÍ................. | 2 |
| CEARÁ................... | 9 | RIO DE JANEIRO........ | 209 |
| DISTRITO FEDERAL........ | 82 | RIO GRANDE DO NORTE... | 6 |
| ESPÍRITO SANTO.......... | 8 | RIO GRANDE DO SUL..... | 31 |
| GOIÁS................... | 18 | RONDÔNIA.............. | 2 |
| MARANHÃO................ | 2 | RORAIMA............... | 1 |
| MATO GROSSO............. | 12 | SANTA CATARINA........ | 16 |
| MATO GROSSO DO SUL...... | 11 | SÃO PAULO............. | 185 |
| MINAS GERAIS............ | 156 | SERGIPE............... | 2 |
| PARÁ.................... | 9 | | |

El la tutaĵo pagis la jarkotizon 1987 nur 354 homoj. Tio signifas, ke dum 1987 B.E.L. ricevis de la anoj Cz$ 106.200,00. Tiun sumon ni uzas por la administraj elspezoj. Sed ni ankoraŭ revas pri bela kaj impona revuo, materialo por amasa disvastigado, moderna perkoresponda kurso, radio-elsendo, k.t.p. Kiel solvi la problemon? Ĝis nun ni ne trovis la taŭgan vojon. Ni pensas, kaj pensas, neniam laĉigas...

*********************

## DISVASTIGO DE ESPERANTO PER GAZETARO AŬ RADIELSENDOJ

Multe da samideanoj sin dediĉas al la disvastigado de Esperanto per la verkado de artikoloj por la brazila gazetaro. En okazoj kiam en la artikolo aperis la adreso de B.E.L., petinformoj pluvis sur nian sidejon. Pro tio ni proponas al ĉiuj verkemuloj mencii la adresojn de ŝtata kaj/aŭ nacia organizaĵoj. Tiamaniere la interesatoj povos serĉi pliajn informojn pri Esperanto, kursoj, libroj, k.t.p.

---

ABONU ESPERANTAJN REVUOJN KAJ GAZETOJN PERE DE B.E.L.

Skribu petante liston kun prezoj

---

## SUPERA KONSILANTARO

Laŭ Art. 18 (alineo "a") de B.E.L.-Statuto, la Supera Konsilantaro estas komponita de membroj indikitaj de la aliĝintaj asocioj, sektoraj societoj kaj dumvivaj kaj individuaj membroj, respective, membroj A, B kaj C.

Ĝis nun, estas 9 aliĝintaj asocioj kaj la indikitaj reprezentantoj estas:

1. BRAZILA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO (BEJO):
   - José Luiz Ferreira
2. ESPERANTISTA ASOCIO DE SANTA CATARINA (EASC):
   - Prof-ro Evaldo Pauli
3. ESPERANTO-ASOCIO DE BRASÍLIA (EAB):
   - Neima Adorno
   - Fátima Pires
4. ESPERANTO-ASOCIO DE SAN-PAŬLO (EASP):
   - Symilde Schenk Ledon
   - Gilbert R. Ledon
   - Oswaldo Leite de Moraes
5. KLUBO ESPERANTISTA ZAMENHOF (KEZ) (PARÁ):
   - Francisco Augusto
6. PARANÁ ESPERANTO-ASOCIO (PEA):
   - Itacir Luchtemberg
7. PERNAMBUCO ESPERANTO-ASOCIO (PEA):
   - Amaro Pinagé Soares
   - Jannes Markus Mabesoone
8. SPIRITA ELDONA SOCIETO F.V.LORENZ (RIO DE JANEIRO):
   - Délio Pereira de Souza
9. ALAGOAS ESPERANTO-ASOCIO (AEA):
   - Aristóphio Andrade Alves Filho

---

## REVUO "GEOLOGIO INTERNACIA"

La 19-an de Aŭgusto pasinta estis oficiale lanĉita, dum solena kunveno en la rektorejo de Federacia Universitato de Pernambuko, i.a. la 7-an volumon de revuo "Geologio Internacia", eldonitan okaze de la Jubilea Jaro de Esperanto. La prezidanto de la kunveno prorektoro por sciencaj aferoj emfazis la eldonon en la Internacia Lingvo, kaj laŭdis la iniciaton de Geologia Departemento. La volumo enhavas 8 artikolojn originale verkitajn en Esperanto, de aŭtoroj el 7 malsamaj landoj. La volumo haveblas ĉe Pernambuka Esperanto-Asocio aŭ ĉe aliaj libroservoj (ĉe BEL, ekzemple), kun prezo de Cz$ 70,00 por ekzempleroj, inkluzive afranko.

## SQUARE DOCTEUR ZAMENHOF

BEL ricevis leteron subskribitan de S-ro R. Boré, je la nomo de Esperanto-Grupo de Chambéry (Francio), datita je la 02/07/87, kiun ni plezure transskribas:

"Estimataj Samideanoj,

Ni plezure anoncas al vi la tutnovan "SQUARE DOCTEUR ZAMENHOF" kiu estis oficiale inaŭgurita la 10-an de majo, en nia urbo.

Ĉi-kune, ni enmetas foton faritan kiam Sinjoroj C.TURZANSKI, Ĝenerala Konsulo de Pollando kaj A. GERVASON, vicurbestro de Chambéry, ambaŭ malkovras la stratpanelon. Dum la ceremonio, nia Esperanto Grupo transdonis al la viĉurbestro la amason da 438 gratulleteroj destinitaj al la urbkonsilio kiu unuanime decidis tiele honori ZAMENHOF. Tiuj gratulleteroj venis el 44 diversaj landoj. Ni profitas tiun okazon por kore danki la 18 esperantistojn de via lando kiuj sendis tian leteron, ĉu propranome, ĉu nome de ilia Esperanto Grupo.

Eble vi povus sciigi tion al viaj legantoj! Se jes, ni estus tre dankemaj al vi se vi povus sendi al ni du ekzemplerojn de BRAZILA ESPERANTISTO kiu raportus, unu por montri ĝin en niaj venontaj ekspozicioj kaj la dua propagandcele, por la franca gazeto LE DAUPHINE LIBERE kiu raportis kaj fotis la inaŭguron.

Tre sincere, estimataj samideanoj, ni antaŭdankas kaj salutas vin.

Nome de nia Esperanto Grupo, R. Boré"

Gratulon al la samideanaro de Chambéry.

---

## INFORMILO POR INTERLINGVISTOJ

Esperantologoj, interlingvistoj kaj aliaj fakuloj interesitaj pri interlingvistika problemaro povas ricevadi "Informilon por Interlingvistoj" eldonatan de Akademia Centro Interlingvistika kaj Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA. IPI-kajeroj enhavas informojn pri nove publikigitaj studoj pri ĉiuj aspektoj de interlingvistiko kaj esperantologio, informojn pri esploroj kaj esplorprojektoj, pri konferencoj kaj seminarioj en kaj ekster la Movado.

Fakuloj interesitaj pri interlingvistika kaj esperantologia temaroj povas ĝin senpage ricevi de: Centro de Esploro kaj Dokumentado de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL BJ Rotterdam, Nederlando.

ĈEFDELEGITO AGAS

S-ro JORGE SOARES DAS NEVES montrante sian laboremecon atakas ĉiujn flankojn. Li jam organizis plurajn kunvenojn kun delegitoj (dum la 23-a BKE, en Volta Redonda, Brasília, Rio de Janeiro, Maceió, Salvador, Ilhéus kaj Itabuna) por pritrakti gravajn temojn, i.a. rilatoj kun BEL kaj lokaj organizaĵoj, (re)membriĝo al UEA, konsisto de la delegita reto kaj delegitagado, renkontiĝoj kaj kongresoj. Li partoprenis de preparkunvenoj por okaziĝo de la 24-a BKE en Maceió, kaj ĉeestis en la Renkontiĝo en Franka/SP. Krom la laboro ene de la movado, li ankaŭ disvastigas esperanton inter la amantoj de aŭto-tendumado (pri kio li estas fakdelegito). Tiel fruktodona agado estas ja imitinda, ne nur de la delegita reto, sed de la tuta brazila esperantistaro.

---

N E K R O L O G O

Forpasis en la urbo Uberlândia, en oktobro/1987, nia samideano CARLOS A. WUTKE. Batalanto por Esperanto pere de Uberlândia Esperanto-Asocio, li sukcesis atingi prosperan laboron. Bedaŭrinde post 1964, mallumaj fortoj, ne bone sciante la celojn de esperantismo, misinterpretis ties altajn idealojn, fermigis tiun Klubon, kaj kunvokis iele-trapele ĉiujn gesamideanojn sin prezenti je la distrikta policejo. De infanoj ĝis olduloj, ĉiuj devis ĉeesti antaŭ tia persono, plenigante tiun epokon de terura angoro, ĉagreno kaj timo. Esperanto-movado preskaŭ mortis, fakte mortis. Nun, kiam S-ro Wutke rekomencis sian laboron en nia plezura kampo, la morto prenis lin, ankoraŭ plena je entuziasmo. Adiaŭ kara samideano Wutke. Kie ajn vi estos ni scias ke vi restos esperantisto, kaj tiel ne forgesos niajn luktojn kaj certe helpos nin en nia laboro.

---

DEZIRAS KORESPONDI

DAVID G. VALECILLOS V. - Adreso: Calle 79 No. 3C-72 - Maracaibo-4002 - VENEZUELO , deziras korespondi kun gesamideanoj de Brazilo (ne gravas ĉu junaj aŭ maljunaj, ĉu viroj aŭ virinoj) pri ĉiuj temoj.

SŁAWOMIR SZYMALA - P.O. Box 486 - 42-217 Częstochowa 17 Pollando - 25-jara, oficisto; Hobioj: foto, turismo kaj muziko; kolektas poŝtmarkojn, bildkartojn kaj mapojn; deziras korespondi kun geesperantistoj el Brazilo.

NOVA ELDONEJO EN ESPERANTUJO

Okaze de la 14-a de Aprilo 1987, la samideanoj Paulo César Ferreira de Lima kaj Fabrício Rodrigues Valle fondis novan eldonejon, nome, ZAMENHOF EDITORES (Caixa Postal 1531 - CEP 74000 - Goiânia/GO), kies laborprogramo konsistos el eldonado de: originalaj verkoj en esperanto; originalaj verkoj en la portugala; brazilaj verkoj tradukitaj esperanten; esperanto-lernolibroj; esperanto-verkoj tradukitaj portugalen; periodaĵoj en la portugala kaj en esperanto.

Nuntempe ili pretigas tradukaĵon de la libro "ESSÊNCIA E FUTURO DA IDÉIA DE UMA LÍNGUA INTERNACIONAL", verkita de Zamenhof kaj tradukita portugalen de Itacir Luchtemberg.

La novaj eldonistoj esperas ricevi senkondiĉan apogon de la tuta esperantistaro.

---

SPECIALA AVANTAĜO

BEL-LIBROSERVO proponas al la esperantistaro libron pri la vivo kaj agado de L.L.Zamenhof kontraŭ tre speciala prezo: po Cz$ 60,00 la ekzemplero. Temas pri la verko de A. López Luna, en la portugala "ZAMENHOF, INICIADOR DO ESPERANTO", eldonita de Irmãos Pongetti, en 1959.

Adoptu ĝin en via kurso por komencantoj. Temas pri leg-end-a libro. Mendu tuj!

---

1-A ARE (AMAZONIA RENKONTO DE ESPERANTO)

- São Luis (MA), 12-15 decembro 1987 -

Informoj ĉe

ASOCIO ESPERANTA DE MARANHÃO

Caixa Postal 357

65001 - São Luiz (MA)

PARTOPRENU!

---

À PROCURA DO IDIOMA UNIVERSAL

Sob o título acima a revista "SUPER INTERESSANTE" da Editora Abril, em seu nº 1 (outubro), publica reportagem de interesse de todos os esperantistas. Que tal levarmos as nossas apreciações aos responsáveis pela reportagem? Cópias à BEL serão bem vindas.

---

## 10-a REGIONA ESPERANTO-RENKONTIĜO

Jorge das Neves

Mi ĵus revenis el Franka (SP), kie okazis 10-a REK, de la 10-a ĝis la 12-a pasintaj. Gratulon meritas nia tre laborema EASP, diligenta k senlaca ŝtata organizaĵo. Elstaris Francini, Elvira k Francisca Martos el ties kompetenta karavano. Tamen meritas specialan laŭdon ĜEZ (Ĝardeno Esperanta Zamenhof),kies membraro (inkluzive gejunuloj k infanoj) sub la gvidado de S-ino Alzira Gomes dos Anjos Baptista k F-ino Vera Márcia da Silva brilegis ĉiusence. Se iu en Esperantujo perdis au perdas entuziasmon nepre iru al tiu urbo por refortigi la spiriton!

(Jorge das Neves estas la Ĉefdelegito de UEA en Brazilo)

## CURSO GRATUITO DE TAQUIGRAFIA POR CORRESPONDÊNCIA

O Instituto Modelo de Taquigrafia abriu inscrições ao seu curso de taquigrafia por correspondência. O Instituto é destinado à difusão da taquigrafia brasileira. Tem sistema próprio dos idiomas: português, inglês, francês, italiano, espanhol, rumeno e ESPERANTO. Pedido das lições à Caixa Postal 58.131 - São Paulo - SP.

## CLUBE DE ESPERANTO DE CAMPOS COMUNICA O SEU NOVO ENDEREÇO

O Clube está funcionando à Rua Ten Cel Cardoso, 821 - CEP 28100 - Campos/RJ. (A Caixa Postal 182 não está mais valendo).

## DEZIRAS KORESPONDI

ALBA ESTELA RODRÍGEZ - Adreso: Ituzaingo 2028, 3000-Santa Fe - República Argentina. Komencantino, volas korespondi kun brazilaj geesperantistoj.

## LOTUMO

Brazila Esperanto-Ligo, celante eldoni la novan perkorespondan kurson, lotumis komputeron kun presilo. La lot-tago estos la 28-an de Oktobro 1987. Al ĉiu kiu aĉetis bileton ni deziras bonan sorton kaj al tiuj, kiuj kunlaboris por la disvendado, ni gratulas kaj prezentas nian plej grandan DANKON!

## REVUO "BRAZILA ESPERANTISTO"

"Se ĉiuj 844 Individuaj Membroj estus pagintaj la jarkotizon, ĝi estus eldonita".

# BEL-KATALOGO 02/87 - SUPLEMENTO

Apresentamos neste SUPLEMENTO, alguns títulos disponíveis junto à LIGA e que farão parte, doravante, dos próximos KATALOGOJ.

Referidos títulos são, em sua maioria, edições da Ĉina Esperanto-Eldonejo e de Silla Chaves.

As encomendas no valor até cz$-200,00, serão atendidas mediante pagamento por meio de cheque nominal a LIGA, vale postal, pagável na Ag. Rodoviária dos Correios, Brasília, DF, em ambos os casos com acréscimo de 10% para as despesas de remessa.

As encomendas na faixa de Cz$-201,00 a cz$-500,00, terão acrescimo de cz$60,00.

As encomendas acima de cz$501,00 poderão ser por reembolso postal, mediante faturamento e a despesa de remessa será incluída na fatura.

Se você é sócio e está quite com a LIGA, faça seu pedido e remeta o pagamento após receber o material e a fatura.

E você ainda pode parcelar o pagamento em duas (duas) vezes se o seu pedido for superior a cz$-2.000,00.

Evidente que se houver alteração no preço, ocasionada por elevação na taxa cambial ou pelos editores, a diferença será cobrada na segunda fatura.

As condições do BEL-KATALOGO 02, que não foram alteradas, neste suplemento, continuam em vigor.

.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo

<u>MEMORIĜU</u> - La tago de "Kontribuo Por Esperanto" estas 28 de oktobro. Ne forĵetu vian bileton.

.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo.xo

ESPERANTO

LÍNGUA INTERNACIONAL

| | |
|---|---|
| Anaseto Kaj Kokota | 60,00 |
| Aŭtobiografio de Bakterio | 80,00 |
| La Avino Ursino | 60,00 |
| Bela Revulo | 80,00 |
| Bestoĝardeno | 160,00 |
| Bukedo Al Vi | 80,00 |
| Ĉasado kun Avĉjo | 30,00 |
| Ĉevalido Transiras Rivero | 40,00 |
| La Feliĉa Birdo | 60,00 |
| La Fiera Generalo | 60,00 |
| La Fiera Multkolora Katero | 120,00 |
| Hejmoj de Birdoj | 120,00 |
| Kapti Vulturon Viva | 70,00 |
| Knabino Ginsengo | 80,00 |
| Kolorigo | 360,00 |
| Konstrui Novan Ponton | 30,00 |
| Kuracaj Manĝaĝoj | 120,00 |
| Magia Peniko | 80,00 |
| Magia ŝipo | 60,00 |
| Nega Infano | 80,00 |
| Ora Hakilo | 80,00 |
| Pezi Elefanton | 200,00 |
| Petolema Kaprido | 80,00 |
| Plaŭ ! Plaŭ ! | 140,00 |
| Rakonte Pri Afanti | 80,00 |
| Saĝo-Sako | 60,00 |
| Serĉi Panjon | 60,00 |
| Simioj Provas Elakvigi la Lunon | 60,00 |
| Tajĝiĝjuan | 120,00 |
| Ilustrita Metodo de Esperanto | 250,00 |
| Vivo de Zamenhof | 400,00 |

Caneta Parker Big Red- recarregável - com inscrição "ESPERANTO" nas cores verde, vermelho, amarelo, azul e branca :-.

| | |
|---|---|
| sem cordão | 200,00 |
| com cordão | 230,00 |

| | |
|---|---|
| Plástico circular "ESPERANTO" 12,5 cm | 50,00 |
| Adesivo "Mi Neniam Krokodilas"- Cent Jaroj de Esperanto - circular - 5,5 cm - Jogo com 5 | 50,00 |

| | |
|---|---|
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 1 ... | 216 |
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 2 ... | 216 |
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 3 ... | 216 |
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 4 ... | 216 |
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 5 ... | 216 |
| AŬDU KAJ LERNU 1 - bendo 6 ... | 216 |
| KARNAVALE .................... | 216 |
| PLURNACIA BUKEDO ............. | 216 |
| LA KORVO ..................... | 216 |
| LA KUNA DISO ................. | 216 |
| PAZ, AMOR E NATUREZA ......... | 216 |
| PACO, AMO KAJ NATURO ......... | 216 |
| KANTU KAJ LERNU - bendo ...... | 216 |
| BESTETOJ... - bendo .......... | 216 |
| DANCE ........................ | 216 |
| KANTU KAJ LERNU - aldona bendo | 216 |
| LERNU KANTANTE - bendo 1 ..... | 216 |
| LERNU KANTANTE - bendo 2 ..... | 216 |
| AI QUEM ME DERA - bendo ...... | 216 |
| A VOZ DO POVO - bendo ........ | 216 |
| BRAZILO KANTAS ............... | 216 |
| CARNAVAL CARIOCA ............. | 72 |
| KARNAVALO EN RIO ............. | 72 |
| KANTU KAJ LERNU 1 ............ | 72 |
| LA ALFABETO DE ESPERANTO ..... | 72 |
| ESTIS PLI BONA TEMPO ......... | 72 |
| SAMBAS PRA NAO CHORAR ........ | 72 |
| CAMPEAO DO MUNDO ............. | 72 |
| PAZ, AMOR E NATUREZA ......... | 72 |
| PACO, AMO KAJ NATURO ......... | 72 |
| KIO ESTAS ESPERANTO? (disko) . | 72 |
| KANTU KAJ LERNU 2 ............ | 72 |
| KANTU KAJ LERNU 3 ............ | 72 |
| AI QUEM ME DERA - disko ...... | 216 |
| LA BUFO ...................... | 72 |
| CANCOES INFANTIS ............. | 72 |
| A VOZ DO POVO - disko ........ | 72 |

| | |
|---|---|
| AŬDU KAJ LERNU - kolekto ..... | 1440 |
| KIO ESTAS ESPERANTO? - kolekto | 120 |
| KANTU KAJ LERNU - kolekto .... | 600 |
| LERNU KANTANTE - kolekto ..... | 720 |
| BESTETOJ... - audvida kolekto. | 1200 |
| BESTETOJ... - AV.kol.provizora | 720 |
| BESTETOJ... - disko kaj albumo | 336 |
| ANIMO PRISMA ................. | 72 |
| POR PLI BONA MONDO ........... | 168 |
| KANTU KAJ LERNU - legolibro .. | 120 |
| KANTU KAJ LERNU - gvidlibro .. | 120 |
| BESTETOJ... - albumo ......... | 120 |
| KIO ESTAS ESPERANTO? - teksto. | 72 |
| AŬDU KAJ LERNU - LEGOLIBRO 1 . | 144 |
| DIDAKTIKA KANTARO 1 .......... | 72 |
| DIDAKTIKA KANTARO 2 .......... | 72 |
| DIDAKTIKA KANTARO 3 .......... | 96 |
| LERNU KANTANTE - legolibro ... | 120 |
| LERNU KANTANTE - vortareto ... | 24 |
| ALMA PRISMATICA .............. | 120 |
| FRAZOJ KAJ KANTOJ... - libretu | 12 |
| O FUTURO DEPENDE DE NOS ...... | 120 |
| LA ESTONTO DEPENDAS DE NI .... | 120 |
| LIBERA EKFLUGO ............... | 168 |
| DIALOGO - revuo .............. | 48 |
| ELEKTITAJ POEMOJ DE C.ALVES .. | 168 |
| TEATRO de Machado de Assis ... | 96 |
| PROVERBARO de Zamenhof ....... | 96 |
| A VIDA DE ZAMENHOF (bindita) | 120 |
| AMOR E ETERNIDADE (med. poem. | 72 |



**DESTINATÁRIO**

**REMETENTE**

BRAZILIA ESPERANTO – LIGO
SCS - Ed. Jockey Club, Sala 103
70300 – Brasília - DF.
Caixa Postal – 11.1105
70084 – Brasília - DF.
BRAZILO

IMPRESSOS